tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

Majo 2024 / n-ro **143**

- La 12a kongreso de kroataj esperantistoj en Prvić Luka junie
- La 10a eldono de la zagreba lernolibro de Esperanto
- Kroata kaj esperantlingva poetino Zora Heide survojas al la centa vivjubileo
- Preparata la zagreba lernolibro por la parolantoj de la svahila

ISN 2991-194X

Karaj legantoj

Saluton el la printempa Zagrebo. La lando ankoraŭ suferas kaj "lekas siajn vundojn" post la grandaj tertremoj en 2020. Multaj domoj en **Zagrebo** estas maskitaj per tolaĵoj malantaŭ kiuj oni iom post iom riparas la zagrebajn fasadojn. La defektitaj domoj tre multas kaj la riparadoj malrapide progresas. Mankas konstrulaboristoj. En la landon envenis multaj eskterlandaj laboristoj, plej multaj el **Nepalo**, **Filipino**, **Hinda Unio**.

Fojfoje la tero sub ni ektremas por memorigi nin ke la danĝeroj ne finiĝis.

En la Esperanta fokuso de la jaro 2024 estas la 12a kongreso de kroataj esperantistoj okazonta de la 21a ĝis la 28a de junio sur la adriatika insulo **Prvić,** en la loko **Prvić Luka**. Kiam ni preparas tiun ĉi numeron de Tempo sepdeko da esperanistoj el kelkaj landoj aliĝis. La organizan laboron transprenis Dokumenta Esperanto-centro el Đurđevac, kie **Josip Pleadin** gvidas la kongresajn laborojn.

Pretiĝis la 10a eldono de la lernilo Esperanto-lernolibro de la Interncia Lingvo en la kroata. Dorsflanke de la lernilo, kiun grafike aranĝis **Ivan Špoljarec**, estis presitaj la kovriloj de 20 aliaj eldonoj de la Zagreba Metodo en aliaj lingvoj troviĝantaj en nia arkivo. Nia amiko, azilpetanto en **Kroatio**, **Eric Nsabiyumva** nun preparas la sŭahilan adapton. Estus bele se la lernilo pretiĝus por aŭgusto, kiam okazos la unua Universala Kongreso de Esperanto en **Afriko**, en **Tanzanio**, en la urbo **Aruŝa**. Kroata esperantistino **Ankica Jagnjić** preparas vojaĝon al tiu Esperanta unikaĵo. Ni esperas ke ni povus tie distribui nian novan sŭahilan lernilon. Ni planas presi ĝin ĉe la aruŝa presejo por eviti transportkostoj.

Eŭropa Esperanto-Kongreso okazos en **Strasburgo** de la 8a ĝis la 12a de majo 2024.Nia nova reprezentanto ĉe Europa Esperanto-Unio estas **Filip Ivančić** bedaurinde ne povos persone ĉeesti.

Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto komencis la jaron 2024 per bela ekspozicio pri Esperanto en la urba biblioteko **Medveščak**. En pluraj fenestroj de la biblioteko aperis afiŝoj kaj libroj kiuj informis pri Esperanto. La ekspozicio daŭris de la 11a ĝis 28a de januaro 2024. Preparis ĝin **Marija Jerković** kun **Nataša Dorosulić**, per la libroj pruntitaj de Dokumenta Esperanto-Centro.

Ĵurnalisto el **Zaprešić** tefonis por krei radio-elsendon pri Esperanto.

La 10an de januaro **Neven Kovačić** por la membroj de Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* prelegis pri la historio de **Israelo**. En februaro prelegis d-ro **Mea Bombardelli** kaj d-ro **Milivoj Uroić** pri la mezurado de la tero, respektive pri la historioj de GPS-indikilo. **Branka Sacher** filmis TV elsendon el la kuirejo de nia apartamento *Espera* en kiu ŝi kuiris**.** La TV-ĵurnalistoj informiĝis pri Esperanto kaj anoncis apartan filmadon kun nia amiko-azilpetanto **Eric.** Ambaŭ elsendoj estas planataj kadre de la populara programo Ĉe ni hejme.

D-ro **Milivoj Uroić** prelegis pri mezurado de la Tero kaj kosmo la 10an de aprilo 2024.

La estraro de Kroata Esperanto-Ligo kunsidis la 17an de marto. Oni elektis **Filip Ivančić** por reprezentanto de **Kroatio** ĉe Eŭropa Esperanto-Unio. La 17an de marto Kroata Esperanto-Ligo atingis unikan jubileon: pasis 21 jaroj ekde kiam KEL aĉetis sian sidejon en Vodnikova 9.

La prestiĝa japana eldonejo **Fukuinkan Shoten**, kiu eldonis en la japana lingvo la libron de **Tibor Sekelj** "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo" en la eldonkvanto de 300 000 ekz. interesiĝis ĉe Kroata Esperanto-Ligo pri la informo kiu posedas la aŭtorajn rajtojn de **Tibor Sekelj**. La eldonejo planas por la jaro 2024 novan eldonon de pliaj 3000 ekzempleroj! Ni konektis la eldonejon kun la vidvino de **Tibor Sekelj Erĵi Sekelj**, nun vivanta en **Hungario**. La libro pri la brazilĝangala knabo **Kumeŭaŭa** estas la plej tradukata libro el Esperanto. Ĝi legeblas en aliaj 26 lingvoj.

Spomenka Štimec ĉe la Kroata Radio Tria programo elsendigis la 14an de januaro 2024 sian vojaĝprozon el la Azura marbordo "Mimozoj el la ĝardeno de Monique", pri ŝia instruado de Esperanto-literaturo en Les Isammbres en Francio en 2023.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj - LIBE invitas al la 88a Kongreso de IKBE okazonta en **Zemun**, **Serbio** de la 17a ĝis la 28a de aŭgusto 2024. La kongreso okazos en la lernejo *Veljko Ramadanović*, kie dum multaj jaroj okazas la edukiĝo de blindaj kaj malforte vidantaj geknaboj. La ĉeforganizanto de la aranĝo estas Serbia Esperanto-Ligo.

Bjelovara Esperantista Societo okazigis sian jarkunvenon la 25an de februaro 2024.

Kroata Fervojista Esperantista Asoco KFEA havis sian jarkunvenon la 12an de marto. La jaron 2023 finis por la societo preleganto **Zlatko Hinšt** per la prelego pri memoroj pri la esperantistoj kiuj havis jubileon en 2023: **Radenko Milošević** (naskiĝis antaŭ 80 jaroj), **Ivo Lola Ribar** (pereis en 1943), fama kroata aktoro **Franjo Majetić**, profesoroj **Josip Vrančić** kaj **Karlo Muhar**, ĉiuj lastaj tri atingus 100an vivjubileon en 2023. Oni memoris ankaŭ D-ron **Dušan Maruzzi** (1883-1956), kiu aŭtoris lernolibron kun multaj eldonoj kaj instruis Esperanton ĉe ekonomi-komerca lernejo en Zagrebo antaŭmilite. Omaĝon oni donis al **Ivo Rotkvić,** la meritoplena tradukisto kiu esperantigis la romanon *Cezaro* de **Mirko Jelušić** kaj esperantigis *Tragedion en la universo* verkitan de grupo da gejunuloj ĉe Observatorio en **Zagrebo.**

Veterana kroata esperantisto **Damir Mikuličić**, grava eldonisto kaj la iama

Zagrebaj esperantistoj en Vodnikova 9.
Fotis B. Sacher

tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj.
Jaro XLV (45), numero 143 (1/2024) ISN 2991-194X. Sona numero 61/2024.
Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004 kaj en 2022, 2023 kaj 2024 ĉe la Biblioteko por blindaj kaj malbonvidantaj personoj en Zagreb. Voĉlegas Spomenka Štimec.
La reta versio de Tempo ĉe: www.esperanto.hr/tempo_kel.htm

Redakcio / Uredništvo; **Eldonisto / Nakladnik:** Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; kel@esperanto.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: *Ana Alebić-Juretić, Zora Heide, Georgo Handzlik, Filip Ivančić, Marija Jerković, Milkica Lukić, Alessandra Madela, Anto Mlinar, Eric Nsambiyumva, Josip Pleadin, Branka Sacher, Srđan Sacher, Bert Schumann, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Dubravko Toplak*

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Sur la titolpaĝo: Mezadriatika etoso. Fotis: Ivan Špoljarec

scienca ĵurnalisto gastis en Esperanto-Societo "Tibor Sekelj" la 13an de marto kaj prezentis poezian vesperon. Li recites plurajn poemojn el la kroata poezio en la originalo kun la tradukoj al Esperanto! Damir en marto 2024 atingis sian 82an vivojaron ĉeestinte en sia vivo lanĉon de la feriado en **Primošten** kaj floradon de la revuo *Homo kaj Kosmo*. Lia eldonejo Izvori eldonis multajn Esperantajn verkojn el kiuj ni akcentas du grandajn vortarojn de **Lucija Borčić, *Granda Vortaro Esperanta-Kroata kaj Granda Vortaro Kroata-Esperanta.*** Li esperantigis la francan bildserion pri Asterix kaj igis **Kroation** la hejmlando de la populara heroo. Mikuličić verkis la sciencfikacian novelaron *O,* kiun esperantigis **Jovan Zarković.**

Spomenka Štimec kaj **Siniša Dvornik** gastis la 20an de marto 2024 ĉe Centro por servoj en la komunumo en **Novi Jelkovec** kaj parolis pri Esperanto al la tieaj loĝantoj havantaj handikapojn**.**

Ni preparas plian vizitonal **Hrvatska Kostajnica** en junio, la hejmloko de grava esperantistino **Antonija Jozičić** por starigi memortabulon sur la fasadon de la lernejo kie ŝi instruis. La tabulon financis la urbo Hrvatska kostajnica laŭ la iniciato de **Josip Pleadin**.

El **Bulgario** atingis nin la dua eldono de la lernolibro laŭ la Zagreba metodo, adaptita de **Mariana Evlogieva** kaj eldonita de Bulgara Esperanto-Asocio en 2014. Tiel la kolekto kreskis al 27 presitaj eldonoj.

Ankica Jagnjić helpadas per zoom-prelegoj al la lernantoj de Esperanto en la afrika **Aruŝa**, kiuj lingve prepariĝas por la renkontiĝo kun la kongresanoj.

Konata kantisto kaj poeto **Georgo Handzlik** disponigis al Tempo sian poemon *Frazlibro de la morta lingvo.*

Rokmuzikisto **Srđan Sacher** vizitis la ejojn de Kroata Esperanto-Ligo en marto. Ni publikigas lian poemon el *Novaj poemoj* en la Esperanta traduko de **Branka Sacher**.

Esperantisto el **Velika Gorica Stipe Muić** vizitis kun sia edzino polino **Malgorzata** en marto **Portugalion** kaj renkontiĝis en **Porto** kun lokaj esperantistoj, kio beligis la restadon.

Spomenka Štimec kontaktis membron de Kroata komisiono pri UNESKO por peti subtenon de la kroata Komisiono pri la Tago de Esperanto la 26an de julio, por kiu varbas Universala Esperanto-Asocio en kelkaj landoj.

Ni ĝojas ke Ministerio pri kulturo kaj amaskomunikado financas tiun nian revuon ankaŭ en 2024. Bonan legadon kaj aŭskultadon!

S. Štimec

Kongreso sur la insulo Prvić

Ek al la 12a kongreso de kroataj esperantistoj!

La 12a kongreso de kroataj esperantistoj gvidas kongresanojn la 21an de junio per speciala buso al la Adriatika maro. La celo estas grava mediteranea urbo **Šibenik** de kiu ni pramŝipos al la insulo **Prvić**, respektive la loko **Prvić Luka**. La ripozejo kiu gastigos nin nomiĝas *Požega*.

Per kio famas **Prvić**? La plej granda vidindaĵo estas la tombo de la fama renesanca sciencisto **Faust Vrančić**.

La kongresa organizanto, **Dokumenta Esperanto Centro**, proponas komunan busan transporton de Zagrebo al Šibenik kaj ŝipan transporton de Šibenik al Prvić Luka. Same validas por la vojaĝo reen. Ofertataj estas ankaŭ la ŝipekskursoj al Naciaj parkoj Kornati kaj Akvofaloj de Krka. Estas planata vizito al Primoŝteno kaj al urbo Split.

Aktualajn kongresajn informojn serĉu ĉe:
https://novo.dec-kroatio.hr/eo/

Kontaktu la organizanton ĉe:
dec.kroatio@gmail.com

Kongreso sur la insulo de Faust Vrančić



Faust Vrančić (latine Faustus Varantinus) estis kroata *homo universalis*, sciencisto kiu kontribuis al multaj kampoj de la homa vivo. Li estas lingvisto al kiu ni dankas la unuan kroatan vortaron kadre de lia libro eldonita en 1595 titolita *Vortaro de kvin plej renomaj eŭropaj lingvoj*, la latina, itala, germana, dalmata kaj ugra (la dua eldono en Prago 1605). Altedukita en multaj kampoj, li estis lingvisto, inventisto, inĝeniero, konstruisto, monaĥo, episkopo. **Vrančić** apartenas al plej grandaj kroatoj de ĉiuj tempoj.

Li naskiĝis en Šibenik la 1an de januaro 1551. Lia onklo estis humanisto, diplomato, eklezia altrangulo **Antun Vrančić** vivinta tiutempe en Hungario, en la nuna **Bratislava**. Ĉe la onklo **Faust** ricevis la unuan edukon kaj poste studis en **Padova** kaj **Venecio**. Poste li fariĝos la episkopo en **Veszprem** kaj sekretario de la reĝo Rudolfo. (Li monaĥiĝis post la frua morto de lia edzino **Marieta**.)

Interesis lin konstrumanieroj de maŝinoj, turbinoj, arkitekturaj temoj. En sia libro *Machine novae* el 1616, eldonita en **Venecio**, li prezentis 56 diversajn teknikajn ilojn kaj komentis ilian konstruon plurlilingve. Tiu libro *Machinae* prezentas la ĉefverkon de la renesanca tekniko. Aparte interesis lin ventmueliloj (ekz. funkcianta je tajdo) kaj horloĝoj.

Lia tre granda inventaĵo estas *homo volans,* la homo uzanta la unuan paraŝuton.

Faust Vrančić mortis en **Venecio** la 27an de februaro 1617. Estinte malsana, li decidis veturi hejmen. Lia deziro estas esti enterigita sur la insulo **Prvić**, en **Prvić Luka** kaj lia tombo estas en la preĝejo de *Santa Maria de Graco.*

Sur la sama insulo estas memorcentro **Faust Vrančić**.

La 12a kongreso de kroataj esperantistoj okazos sub la signo de lia paraŝuto sur lia ŝatata insulo.

S.Š.

Pri la programo de la 12a kongreso

Anto Mlinar intervjuis la ĉeforganizanton de la 12a kongreso de kroataj esperantistoj pri la programo de la kongreso.

Jen la respondo de Josip Pleadin (DEC):

„Dum la 12a kongreso de kroataj esperantistoj en Prvić Luka (21a – 28a de junio 2024) okazos jenaj programeroj:

– Kunsido de Asembleo de Kroata Esperanto-Ligo (la 24-an de junio)

– Kurso de Esperanto por lernantoj el lingva gimnazio el Zagrebo sed ankaŭ por aliaj kandidatoj (de la 22a ĝis la 27a)

– Prelego de Robert Milijaš pri droneoj (la 24an)

– Lanĉo de Registro de esperantistoj en Kroatio kaj koncerto de Neven Mrzlečki (la 23an)

– Prezento de nova romano „Alina“ de Julian Modest (la 25an)

– Projekcio pri la vivo de Antonija Jozičić,

– Prezento da la 13a kongreso en Slavonski Brod en 2025.

Krome, estas planata vizito al la Muzeo pri Faust Vrančić (la 21an), ekskurso al la Nacia parko Kornati (la 22an), ekskurso al la Nacia parko Krka (la 22an), vizito al Primošten (la 28an).

Restas sufiĉe da tempo ankaŭ por agrabla feriado. Intertempe ni akceptas novajn programproponojn!

Se vi havas ideojn, kontaktu nin:
dec.kroatio@gmail.com “.

Primošten. Fotis IŠ

Lernolibro ZM – la 10a kroata eldono!

LA NOVA ELDONO DE LA ZAGREBA LERNOLIBRO PRI ESPERANTO

Aperis la 10a prilaborita kaj plibonigita kroata eldono de la jam fama lernolibro **Esperanto** (Udžbenik međunarodnog jezika) laŭ la Zagreba Metodo. La eldonisto estas Kroata Esperanto-Ligo.

La aŭtoroj estas **Roger Imbert, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec** kaj **Zlatko Tišljar**. La novan eldonon grafike aranĝis **Ivan Špoljarec**, kiu tradicie grafike aranĝis la antaŭajn eldonojn. Sur la dorsa paĝo de la lernilo troviĝas la titolpaĝoj de la presitaj 20 eksterlandaj eldonoj de nia lernolibro. La novaĵo estas ankaŭ la QR-kodoj kiuj troviĝas ĉe ĉiuj lecionoj kaj kantoj tiel ke lernantoj povas, helpe de poŝtelefono, aŭdi la sonan registrajon de la rilatantaj tekstoj.

Nikola Rašić reverkis sian ampleksan postparolon *Esperanto kaj esperantistoj*.

Fakte ekzistas 11 eldonoj de la lernilo en la kroata, sed unu ne estas eldonita per la latina skribo sed per la brajla. Ĝin eldonis **Antun Kovač**.

Formato: 21x 15 cm

ISBN 978-953-96918-7-3

Pagoj: 80

Prezo: 10 eŭrojn plus sendokostoj

Mendeblas per kel@esperanto.hr
aŭ per poŝtelefono 091 4617550.

Lernolibro ZM – en la svahila

John Magessa, esperantisto el Tanzanio, kunlaboranto por la lernolibro kaj la sekretario de LKK

Por la Universala Kongreso de Esperanto en **Aruŝa** en **Tanzanio**, Kroata Esperanto-Ligo preparas plian afrikan eldonon de la lernolibro laŭ la Zagreba Metodo. En la jaro 1982 aperis en formo de modesta broŝuro la lernolibro por la kirunda lingvo, kiun preparis la tiam zagreba studento pri ekonomio **Antoine Ntsigana**. Nun la azilpetanto el **Burundo**, profesie lingvoinstruisto, **Eric Nsabiyumva** preparas la duan plibonigitan eldonon en sia gepatra lingvo. Krom en la kirunda li preparas ankaŭ la lernolibron de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo en la svahila.

Ni planas prezenti tiun lernolibron dum la kongreso en **Tanzanio**. Nun ni serĉas presejon en **Aruŝa** (kiu presos ankaŭ la kongresan libron). Ĝi presu ankaŭ la svahilan lernilon. La sponsoro de la eldono estas prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo **Anto Mlinar**. Flanke de la estraro de KEL al **Tanzanio** kongresos **Ankica Jagnjić** kiu havas la taskon prezenti la libron dum la kongreso kaj donaci ekzempleron al ĉiu LKK-ano.

SŠ

* *Esperanta lingvonomo por Kiswahili, la lingvo parolata en la mezorienta parto de Afriko, estas "la svahila" laŭ la rekomendo de Akademio de Esperanto, sed en la uzo lestas ankaŭ la alternativaj formoj "suahila" kaj "sŭahila".*

Antonija Jozičić ricevos memortabulon en Hrvatska Kostajnica kaj… atingis Novjorkon

La prestiĝa Esperanto-eldonejo *Mondial* kun la sidejo en **Novjorko** publikigis en sia numero 48 por oktobro 2023 prozon de **Spomenka Štimec** *Bukedo por Fraŭlino Antonija*. Ĝi prezentas al la internacia legantaro tiun modelan kroatan esperantistinon el **Hrvatska Kostajnica** (1869 - 1945). Al ŝi ni dankas esperantigon de la romano *Konfeso* de la kroata aŭtorino **Milka Pogačić**, kiun **Antonija Jozičić** publikigis en **Kostajnica** en la jaro 1913! La esperanta verko atingis Ŝangajon kaj tie ĉinigis la verkon la ĉina esperantistino **Wang Luyan** (1901-1944), la akompananto de la rusa Esperanto-poeto **Vasilij Eroŝenko** dum lia restado en Ĉinio. Tiutempe en Ĉinio ne estis kutimo traduki frazon post frazo de eksterlanda libro, sed resume rakonti ĉapitron post ĉapitro. Kroata Esperanto-Ligo ricevis el Ĉinio la faksitajn paĝojn de la tradukita libro en la ĉina el la biblioteko**,** kie ĝi estas konservata**.**

Kroata Esperanto-Ligo preparas ekskurson por siaj membroj al **Hrvatska Kostajnica,** kiel ni jam faris en oktobro **2023.** La ĉi foja ekskursa celo estas starigi sur la fasadon de la lernejo, en kiu **Antonija Jozičić** instruis, memortabulon honore al la entreprenema instruistino. La tabulon organizis **Josip Pleadin** nome de Dokumenta Esperanto-Centro kaj finance ĝian kreon ebligis la urbo **Hrvatska Kostajnica**. **Pleadin** ankaŭ prepares monografion pri la vivo de **Antonija Jozičić**. Nia membro **Faruk Islamović** gvidos la grupon dum la omaĝekskurso kaj malkovrigos al la partoprenontoj plurajn nekonatojn detalojn pri la landlima urbo sur la bosnia rivero **Una**.

Sur la apuda foto estas frontpaĝo de la revuo Frauen-Fleiss el Vieno kiu fine de la 19a jarcento inspiris alian laboron de **Antonija Jozičić** krom tradukado – brodadon kaj kroĉetadon.

S. Štimec

Revuo Frauen-Fleiss *el Vieno. Fotis Milkica Lukić.*

FIUMA IDIOMO EN “ETNISMO”, INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

Ana Alebić-Juretić prelegas

Post UK kongreso en Torino, la karavano alportis min al kuna ILEI-IJK kongreso en Lignano Sabbiadoro. Mi ŝatis tiun komunan programon, kaj mi partoprenis al TEJO programo *Lingva festivalo,* organizita de Ranja Robertine Jeanne d’Arc Lydie Zafinfotsy (la malagasa Esperanto - verkistino) la 6a de Aŭgusto 2023 por prezenti denaskajn paroladojn kaj instrui ion de la lingvo. En ĉiu okazo, mi prezentis mian fiuman idiomon, paroladon ankoraŭ uzatan por komuniki inter la loĝantoj de Rijeka (eksa Fiume) de itala origino kaj kulturo. Fakte, la fiuma idiomo estis oficiale uzata en la urbo Fiume ekde la 13a jarcento ĝis la 1947., kiam la urbo estis aneksita al Jugoslavio. Nun ĉirkaŭ 5000 loĝantoj en la urbo parolas la lingvon, kaj estis endanĝerigita malaperi. En tiu prelego partoprenis ankaŭ redaktoroj de la esperanta revuo *Etnismo*, Nicole Margot kaj Alain Favre, kiuj petis min verki ion pri la fiuma idiomo. La revuo *Etnismo* estas informilo pri etnaj problemoj eldonita de Internacia Komitato pri Etnaj Liberecoj (IKEL) kaj presita dufoje jare. La estraro de *Etnismo* estas vere multetna, formita de savojano, vaŭdanino, du katalunanoj, asturleono, eŭsco, hungaro kaj ĉuvaŝo.

Mi verkis du artikolojn: la unua pri la lingvo mem kun titolo: *Fiuma idiomo: lingvo aŭ dialekto?* (No.112, 31.12.2023, p. 4-11), kie estis priskribita la gramatiko de la idiomo, kun ekzemploj de ĉiutagaj frazoj. Mi tre ŝatas la komentojn de redaktoro kiu trovis iujn similecojn kun aliaj lingvoj ĉe la Mediteranea maro, kiel la hispana kaj la kataluna pere la genro de iuj fiumaj vortoj: ekzemple *sango* (Eo, vira), il sangue (ital. vira) sed la sangre (hisp., ina), la sang (katalune, ina) kaj la sangue (fiuma, ina). Alia ekzemplo estas la uzo, de duoblaj rilataj pronomoj en demandoj, uzataj ankaŭ en arpitana lingvo: *Chi che vegnera doman?* (fiuma) vs. *Qui que vindrat deman*? (arpitan). Kiel ekzemplo de la teksto en fiuma idiomo estas presita la poemo de Arturo Caffieri, alinome de Rocambole (Fiume, 1867-Fiume, 1941): *En la nokto de mortintoj,* amuza poezio kun serioza titolo. Mi estas tre kontenta por la redaktado de la artikolo. La dua artikolo pri la Fiuma literaturo (poezio) estos eldonita en la sekvonta numero de *Etnismo,* en junio 2024.

D-ro de scienco, inĝ. Ana Alebić-Juretić

RENKONTE AL LA CENTA VIVJUBILEO

Zora Heide (2022). Fotis Dubravko Toplak

La zagreba esperantistino **Zora Heide** apartenas al tiuj esperantistoj el la zagreba rondo kiuj dum jaroj multege kontribuis al la Esperanto-literaturo kaj al la periodaĵoj en Esperanto. Ŝi naskiĝis la 23an de novembro 1924 en **Levinovac** apud **Virovitica**. Esperanton ŝi lernis knabinaĝe de sia patro, instruisto **Mijo Vinceljak** ((1894-1987). Ŝia fratino **Marija Toplak** ankaŭ lernis Esperanton de la patro. Ŝi komencis studi juron en **Zagrebo** sed ricevinte diplomon de laboratoria teknikisto, ŝi eklaboris ĉe la Urba Higiena Instituto. Edziĝinte al la dana esperantisto **Heide**, kies nomon ŝi prenis, ŝi eklaboris en kelkaj laboratorioj en **Danio**. En 1979 ŝi forlasis **Danion** kaj ekloĝis en Svedio. En **Zagrebo** ŝi aktivis kiel kursgvidanto kaj kunredaktoro de fervojista periodaĵo. Literature ŝi debutis en *Norda Prismo* per poemo *Enigmo* en *1964*. Dum ŝia vivo en la nordo ŝi membris en Dana verkista asocio kaj poste en Sveda verkista asocio. Ŝi translokiĝis al **Islando** de kie ŝi en la jaro 1995 por la Unua kongreso de kroataj esperantistoj sendis sian mirindan saluton. Dum ŝia tuta vivo ŝi tradukis al Esperanto. Kiel amikino de la kroata verkistino **Višnja Stahuljak Zora Heide** aparte multe tradukis el ŝia poezio (Poemaro *Krepuskoj*). Unu el ŝiaj plej belaj tradukoj estas la prozo de **Đuro Sudeta** *Mor – Fantasta rakonto,* eldonita en **Bjelovar** en 2022. Ŝi gajnis multajn premiojn ĉe la italaj *Picenum, Gradara, Larius, Tridentum en 1967, 1968,1974,1975,1976,1977* kaj *Europa* en 1978*, premion Juan Miguel Piquero en* Hispanio *1982.* Ŝi estis laureato de la konkurso *Liro 2000* en **Jekaterinburg.**

Ŝiaj verkoj troviĝas en diversaj antologioj La verda relo 1982, Sub la signo de socia muzo, 1987, Antwerpen, La Trezoro, Budapeŝto 1989, Kroata poezio, 1983, En tiu terura momento 1998.

Post kelkaj jaroj en Islando ŝi denove fariĝis zagrebanino.

Ŝi estas verkisto kun pluraj identecoj kaj pluraj lingvoj. Ŝiaj verkoj aperis en antologioj de kroataj verkistoj verkantaj eksterlande. Ni konsentas kun ŝia prijuĝo “Ŝia koro havas kvar vetiklojn, la plej granda estas la kroata.”

Zora ne ŝatas festojn. Ŝi estas la granda, silenta, modesta sponsoro de ne nur kroata Esperanto-Movado. Dankon, Zora pro ĉio kion vi faris por nia Esperantujo kaj por la kroata literaturo.

S. Štimec

Intervjuo kun la azilpetanto en Kroatio

– *Saluton, Eric!*
*Pasis 16 monatoj ekde kiam vi kontaktis Kroatan Esperanto-Ligon kun la informo ke vi, afrikano, estas en Kroatio, en la hotelo por azilpetantoj. Dum 16 monatoj vi atendas la respondon de la kroataj instancoj pri via azilpeto. Ĉiuj viaj kolegoj el **Burundo** kiuj alvenis samtempe kun vi jam ricevis la nean respondon.*

- Mi ankoraŭ atendas la respondon
- *Ĉu la fakto ke vi ne ricevis respondon de la kroata instancoj por vi estas esperiga?*
- Eble tio estas bona signo. Eble ne.
- *Kion faras viaj samlandanoj kiuj estis rifuzitaj?*
- Ili havas rajton prezenti plendon per speciala advokato kiu tiun laboron faras senpage.
- *Kiel vi pasigis vian tempon en Kroatio?*
- Plej grava afero estas ke, post kiam mi deklaris ke mi serĉas azilon en Kroatio kaj donis miajn fingrospurojn al la arkivo de la kroata instanco, oni loĝigis min en Centro Porin, la centro por azilantoj. Tie estas multaj homoj similsortaj. Estas bela sento havi tegmenton surper la kapo kaj rajton je manĝoj. Eĉ tri manĝoj tage.

  Necesis longa tempo ĝis mi trovis postenon. Mi laboras en deponejo de iu konata transportfirmao. Ĝi havas sidejon en **Hrvatski Leskovac** kaj mi ĉiutage veturas tien. Mi laboras nokte. Tage mi ekveturas buse je la 15a horo, nokte revenas. Oficiale mia laborhoro estas ĝis noktomezo, sed ofte mi devas resti por kromlaboro. Sed mi tre kontentas. Estas granda beno havi laboron. Mi povas parton de la salajro ekspedi al mia edzino kiu zorgas pri miaj du filoj kaj pri mia panjo.
  Kiel azilpetanto mi ne devas pagi vojagbiletojn en tramo.
- *Kaj kiel vi pasigas la liberan tempon?*
- Mi lernas la kroatan ĉe tri instancoj: ĉe la Ruĝa Kruco, ĉe Kroata Esperanto-Ligo kaj ĉe mia preĝejo, ĉe mormonoj, La eklezio de la sanktuloj de la lasta tago.

  Mi lernis multege pri la lando. Mi ricevis ĉi tie multajn geamikojn, el kiuj multaj per Kroata Esperanto-Ligo. Mi vizitis hejmojn de ses kroataj esperantistoj kaj lernis pri kutimoj kaj manĝoj ĉe Ankica, Tina, Judita, Neven, Spomenka, Sanja…

  Mi partoprenis multajn Esperanto-aranĝojn, ekz. en **Bjelovar**, **Hrašćina**, **Đurđevac**, **Ogulin** kaj kompreneble en **Zagrebo**.

  Mi lernis kiel funkcias la socio en **Kroatio**. Mi vizitis plurajn instancojn kiuj helpas al azilpetantoj, ekz. Centar za mirovne studije.

  Mi prelegis en 3 bibliotekoj. En unu, tiu en la urbo **Zaprešić**, mi prelegis pri **Afriko**, **Burundo** kaj la svahila lingvo en Esperanto kaj en du en **Nova Zagrebo** en la angla… Mi okupiĝis pri instruiloj por

  Esperanto. Mi korektis la lernolibron pri Esperanto laŭ la Zagreba Metodo en mia gepatra lingvo. Kun tiu lernilo mi konatiĝis en mia hejmlando ĉar la internacia instruistino alportis ĝin ĝis tie. Nun mi laboras por adapti la zagreban lernolibron al la svahila. La svahila estas parolata en dek kvar afrikaj landoj de ĉ. 200 milionoj da homoj.
- *Kaj kio estas la plej malfacila?*
- Lerni la kroatan, tre malfacilan lingvon. Mi ja estas poligloto. Mia hejma lingvo estas kirunda, mi parolas la francan kaj la anglan. Mi parolas la lingalan. Mi estis lingvoinstruisto en lernejo sed neniu lingvo de mi lernita havas sep kazojn en singularo kaj sep en pluralo… Necesas lerni amason da vortformoj. Esperanto iom helpas min orientiĝi. Nur iom.
- *Sed vi tre bone progresas!*
- Mi ne dirus! Ĉiam mi faras erarojn.
- *Forgesu pri eraroj! Ni korektadas vin kaj vi perfektiĝas iom post iom.*
  Vi portas vian edzinon kaj viajn du infanojn sur la ekrano de via poŝtelefono. Ĉu ankaŭ niaj legantoj rajtas vidi ilin?
- Bnvolu!

Intervjuis S. Štimec

NOVA ELDONO DE LA LIBRO DE CLEMENS J. SETZ EN ESPERANTO



La novjorka eldonejo **Mondial** eldonis la verkon de la prestiĝa aŭstra verkisto **Clemens Johann Setz** en Esperanto. En tiu verko li metis en la fokuson la planlingvojn kaj profunde analizas ilin. Apartan atenton li donis al Esperanto kiun li speciale lernis por povi atingi ĝian esencon. Al Esperanto li dediĉis ĉ. 100 paĝoj de sia verko, prezentante la Esperantan literaturon per la literatura sorto de blinda esperanta poeto **Vasilij Eroŝenko**. (**Spomenka** Štimec estas unu el la aŭtoroj kiujn li pli detale traktas.) La verkisto veturis al **Japanio** por serĉi la spurojn pri **Eroŝenko** en la 21a jarcento. La titolo de la verko "La abeloj kaj la nevidebla" rilatas al la verso de granda germana poeto **Rainer Maria Rilke**. Ĉu ankaŭ esperantistoj agas diligente kiel abeloj sed la rezulto de la ilia laboro estas nevidebla?

Por la verko inspirita per la planlingvoj la aŭtoro estis en 2022 premiita per la plej alta premio por la germana literaturo *Georg Büchner Premio*.

Esperanto-kulturdomo **Gresiljono** en **Francio** organizas ĉiujare intensajn kursojn de Esperanto de ĉiuj niveloj: A1-A2, B1, B2 kaj C1-C2. La plej malfacila tasko por mi estis atingi Gresiljonon, ĉar la vojaĝo el Kroatio similas al vojaĝo al mezo de la Tero. Mi ekiris je la 4 matene (aŭ nokte) per buso ĝis la flughaveno en Zagrebo. Per aviadilo mi atingis Parizon, kaj tie prenis la trajnon por La Mans. Mi daŭrigis per buso ĝis La Fleche kaj Baugé, kaj la lastan vojparton mi piedis (sen valizo, kiu veturis) nur por diri ke mi uzis ĉiujn rimedojn por atingi la celon – la kastelon Gresiljonon, en la mezo de la Tero.

Ĉi tiun jaron la staĝo okazis en periodo de la 12a ĝis la 21a de aprilo 2024 kun 34 partoprenintoj el ok landoj. La plejmultaj estis francoj. La gvidantoj estis **Marion Quenut** por la A1-A2 kurso nomita "Ni Kuneku!", **Zsófia Kóródy** por B1 nomita "Lernu kun ĝojo!", kion ŝiaj lernantoj vere faris, kaj **Pawel Fischer-Kotowski** por B2 nomita "Kuraĝe antaŭen!". Li daŭrigis siajn lecionojn dum manĝotempo, tial efike ke por pago li ricevis desertojn. Por C1-C2 nivelo la gvidanto estis la prezidanto de UEA **Duncan Charters**, kaj tiu grupo okupiĝis pri "Perspektivoj pri Esperanto". Mi partoprenis en tiu grupo de dek membroj. Krom la sinesprimo kaj gramatiko ni laboris pri verkado de gvidilo por esperantistoj kiuj partoprenos UK-n en Aruŝo. Pro tio ni partoprenis la Zoom kunvenon kun esperantistoj el **Afriko**. Ni diskutis pri kutimoj kaj interkultura komunikado. Por la vespera programo nia grupo ankaŭ preparis du skizojn pri la sama temo. Dum la vespera programo **Arno Lagrange** faris interesan prelegon pri **Stefan Zweig** kaj prezentis lian "Ŝaknovelon" kiel solo-teatraĵon en kiu li ludis dek rolojn per ŝanĝo de la ĉapeloj. **Mike Sloper** el **Usono** prezentis programon "Muzika amuziĝo". La temo de mia prelego estis "Pri 'faŝista', 'komunista' kaj aliaj arkitekturoj – laike", kie mi montris ke arkitekturo ne dependas de politikaj reĝimoj.

La lasta tago estis dediĉita al parola parto de KER ekzamenoj. Dankon al **Jannick** kaj **Bert** por la bona organizo.

Ana Alebić-Juretić

Partoprenintoj de PRINTEMPaS 2024.
Fotis Bert Schumann

DONACO DE KROATAJ LIBROJ por Esperanto-Muzeo en Zaozhuang en Ĉinio

Kroata Esperanto-Ligo donacis sep librojn el la kroata kulturo tradukitaj el kaj al aziaj lingvoj el Esperanto. La librojn ricevis Esperanto-Muzeo en **Zaozhuang** en **Ĉinio**. La peranto estis **Alessandra Madella**. Okaze de la donaco **Ĉina Radio Internacia** elsendis intervjuon kun **Spomenka Štimec.** La intervjuo estas ankaŭ legebla sur la paĝoj de **Ĉ**RI:

https://esperanto.cri.cn/2024/03/15/ARTInCBmyL7LXkwLVJNSZ9Ky240315.shtml

Alessandra Madella transdonas la kroatajn librojn tradukitajn al aziaj lingvoj al Esperanto-Muzeo en Zaozhang. Fotis A. Madella

Ekspozicio pri Esperanto en la zagreba biblioteko Medveščak

Marija Jerković kaj Nataša Dorosulić organizis nome de UPE - Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto libroekspozicion sub la titolo „Kroata literaturo en Esperanto“ dum januaro 2024 en la biblioteko Medveščak. La ekspozicio estis lokita en la montrofenestroj de la biblioteko. Sur la foto de Marija Jerković unu el la fenestroj de la ekspozicio kun la Esperanta temo.

Fotis Marija Jerković

KANTO EN ESPERANTO ĈE EUROVIZIO?

En la elekta konkurso por Eŭrovizia Kantfestivalo unu kanto ĉi jare estis prezentita en Esperanto. Por **San Marino** kantis **Sando Machado**, rumandevena kantisto el **Brazilo** kiu bedaŭrinde ne eniris la finan elekton.

TV-FILMADO PRI MANĜAĴO en la ejoj de Kroata Esperanto-Ligo

Branka Sacher, membro de Kroata Esperanto-Ligo, la aŭtorino de du libroj pri manĝaĵoj en la kroata (kaj tradukataj en Esperanton), gastis en la elsendo de la kroata TV la 6an de marto 2024. Temis pri la programo “Ĉe ni hejme”/”Kod nas doma” en kiu foje gastas iu kuiristo.

Branka kuiris la bongustaĵojn en la kuirejo de la apartamento Espera. Ĉe la fino kelkaj esperantistoj venis por gostumi la rezultojn. Ni ĝojis havi TV-teamon en niaj ejoj kaj esperis havi mencion pri Esperanto en la elsendo. Tio ne okazis. Tamen la ĵurnalistino, konatiĝinta kun nia ĉetabla gasto **Eric**, esperantisto el **Burundo**, decidis al li dediĉi venontan elsendon. Li nun preparas la svahilan lernolibron pri Esperanto, inspiritan per la lernilo laŭ la Zagreba Metodo. Li ankaŭ zorgas pri la dua eldono en lia geptra lingvo la kirunda. La venonta filmado ĉe la kroata TV estas planata por 2024.

S. Štimec

Esperantistoj gustumas la specialaĵojn de Branka Sacher. Fotis B. Sacher

Eŭropa Esperanto-kongreso 2024 en Strasburgo

Enkonduko

La ĉi-jara Eŭropa Esperanto-kongreso okazos ekde la 8-a ĝis la 12-a de majo en Strasburgo. Ĉi-tiu urbo en orienta Francio verŝajne ne hazarde estas elektita loko de la kongreso, ĉar en ĝi troviĝas la sidejo de la Eŭropa Parlamento (ekde 1957) kaj de kelkaj aliaj gravaj eŭropaj institucioj. Krom tio, Strasburgo estas konsiderata por la naskiĝurbo de la presarto kaj UNESKO nomumis ĝin **Tutmonda ĉefurbo de la libro 2024**. Same kiel dum la pasintaj jaroj, la ĉi-jara EEK proponas al la partoprenantoj kaj la vizitantoj buntan kaj enhavoplenan programon, en kiu ĉiu povos trovi ion interesan laŭ siaj propraj preferoj.

Temo kaj programo de la kongreso

La ĉefa celo de la kongreso estas kunigi Esperanto-parolantojn de ĉiuj niveloj, kaj tiel proponi unikan ŝancon por renkontiĝoj favoraj al interŝanĝoj kaj diskutoj. Inaŭguro de la kongreso okazos en la ĉambroj de strasburga Universitato, la 9-an de majo (Tago de Eŭropo kaj Tago de venko super faŝismo). La ĉefa temo de la kongreso estos *Dialogo inter popoloj, portanto de paco.* La saman tagon en la Amfiteat okazos fermita Asembleo de EEU. La ĉefaj elementoj de la kongresa programo estas kursoj, prelegoj, spektakloj, ekskursoj kaj renkontiĝoj.

Katalin Kovats, la estro de la KER-ekzamena Centro prezentos la ekzamensistemon kaj donos utilajn informojn pri la juniaj retaj ekzamenoj kaj aliaj sesioj. Dum la tuta daŭro de la kongreso ĉiutage estas planitaj diverstemaj prelegoj prezentitaj de eminentaj membroj de Esperantujo. Dum la vesperaj horoj ili povos aŭskulti koncertojn de famaj esperantaj muzikistoj kaj muzikensembloj. Krom tio, la partoprenantojn atendas pluraj ekskursoj, daŭrantaj unu tagon aŭ kelkajn horojn. Por la 8-a de majo estas planitaj tri vizitoj: vizito de la katedralo Notre-Dame, de la kvartalo Neustadt kaj de la Eŭropa parlamentejo. La vizitantoj ankaŭ havos la eblecon viziti multnombrajn interesajn muzeojn kaj palacojn en Strasburgo kaj ĉirkaŭaĵo. Por tiuj, kiuj deziras daŭrigi la plezuron ĝui la vidindaĵojn kaj belecon de Alzaco kaj esti kun esperantistoj estas proponita la postkongresa tuttaga ekskurso, kiu okazos lunde, la 13-an de majo. La postkongresa ekskurso inkluzivas viziton al la kastelo de *Haut-Koenigsburg*, komunan tagmanĝon en tradicia alzaca restoracio *L'Orée du Château* en Orschwiller kaj viziton al la urbo Colmar.

Filip Ivančić

Georgo Handzlik

FRAZLIBRO DE MORTA LINGVO

Mensmalsana idioto,
Putra laĉo en la koto,
Misamiko, bov', azeno,
Mola kaco kaj kreteno.

Krokodil', volapukisto,
Angla-lingvo-instruisto,
Unutaga kongresano,
Sterko, feko kaj guano.

Poreterna komencanto,
Balbutanta diletanto,
Spertulino pri feliĉo,
Dik-putino, loza piĉo.

Lasta ino en bordelo,
Ingulino, verda ŝtelo,
Fi-aĉulo aŭ bandito,
Korinfarkton dum koito.

Rat-afabla, stulta mulo,
Ul' bonvena kiel kulo,
Mamulino grandbalona
Cic' bombasta silikona.

Edz' fidela kiel Kabe,
Okulist' rigardas strabe,
In-matraco, fik-maŝino,
Amorema blondulino.

Bombastulo, etfripono,
Sencerbulo kaj bufono,
Blov' de malfacila vento,
Rano, porko, muŝ', serpento.

Absoluta verda nulo,
Nekompren', bonantagulo,
Koruptita sentaŭgulo,
Verda rano, fik-fuŝulo.

Naivulo, finvenkisto,
Rusta stel-esperantisto,
Malamiko, bov', azeno,
Mola kaco kaj kreteno.

Se sub nia verda stelo
Tiel ĉarmas la kverelo,
Ĉu kun tia stoko vorta
Esperanto estas morta?

Noto:
Georgo Handzlik, (**Jerzy Handzlik**) la pola kanzonisto, aktoro kaj poeto plezurigis multajn per sia komento per kiu li refutas tiujn kiuj asertas ke Esperanto ne estas esprimkapabla, do, la morta lingvo. Plurfoja gasto ĉe diversaj kroataj Esperanto-aranĝoj li permesis ke Tempo publikigu la tekston de lia kanzono *Morta lingvo*.

Srđan Sacher

:kelkfoje kelkaj urboj malaperas:

ili sinkas en la grundon pro honto kaj malhonoro
aŭ la maro englutas ilin
por lavi ilin

iliaj nomoj ne estas plu elparolataj
kaj oni eltranĉas ilin
ili malaperas de la landmapo-bildo
kiel aĝaj batalkamaradoj de Stalin

mi surbendigis tie muzikalbumojn
enŝipiĝis
amis
kaj unufoje al mi
ankoraŭ juna kaj kun vastigita konscio
la kampanilo de la katedralo aspektis kvazaŭ fandita
glaciaĵo
vanilo-ĉokolado

hodiaŭ ĝi aspektus al mi kvazaŭ ponardo

Elkroatigis Branka Sacher



Foto: Ivan Špoljarec - Štef